


SENDA 17 1993

10-97

# Gazeto Andaluizia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

10-a Jarkolekto ■ Septembro, 1993 ■ N-ro 35





## GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado de Correos 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1.136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal, 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO, José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ

### ENHAVO

Efika Esperantismo / 2	1
Sub la lupeo	2
Hispana Esperanto Muzeo	3
Poezia Angulo	4
Intervjuo	5
Tutmonde	7
Iluzii	8
La Fenomeno Chesto	9
Politiko kaj Esperanto	10
10 Sciindaj aspektoj pri...	11
Amuzaĵoj	12
Pri la Esperantigo de la Nomoj	14
Ĉu la artoj troviĝas en dekadenco?	15
Niaj legantoj parolas	16
Esperanto Aplikata	17

Jen nova numero de *Gazeto Andaluza*. Lastmomenta novaĵo por tiuj kiuj ne kongresumis en Valencio: la ventonta Hispana Kongreso okazos en Andaluzio! Ni informos vin proksime. Dume, ek al la legado! Ĉi numere ni denove lotumos libron inter la solvontoj de nia krucvortoj.



## Efika Esperantismo / 2

Ĝenerale, oni timas prezenti la esperantismon kiel ideon kaj pro tio la esperantisma ideo estas malmulte disvastigata, nur okaze kaj tre simple per la himno *La Espero*, kaj la lingvo Esperanto sen la ideo stumpas. Eble oni timas prezenti la esperantisman ideon por eviti diskutojn, kiuj povas generi disputojn. Sed la ideo kvieteco kunportas mankon de vigleco kaj stagnon.

Ne pri la tuta indiferenteco antaŭ Esperanto kulpas la aliaj. La fakto estas, ke ni estas fermitaj en ni mem, sen ekstera influo, kaj la nura propagando de la lingvo ne sufiĉas. Ankaŭ prezenti la internan ideon de Esperanto tre simpla povas ŝajnigi ĝin naiva. La nura uzado de Esperanto por interrilatiĝi ne supozas interkompreniĝon. En ĉiu civila milito ne ekzistas la lingva baro kaj malgraŭ tio, ambaŭ bandoj ne interkompreniĝas, kaj tiaj militoj daŭras ĝis elĉerpiĝo. Tiu propozicio devas esti inversigita. Devas esti la volo por la interkompreniĝo, kio devas doni impulson al la lernado de Esperanto. Do, anstataŭ sen klariĝo komenci kaj rekomenci kursojn de Esperanto, povas esti konvene, ke antaŭe oni konvinkigu pri la rolo de la lingvo kaj poste, al la konvinkitaj instrui Esperanton. Tiel povas eble esti evitata, ke multaj komencas kursojn de Esperanto, malmultaj finas ilin kaj nur kelkaj eskeptuloj fariĝas aktivaj en la movado.

Se antaŭ ol cent jaroj, kiam Esperanto komencis disvastiĝi, povis efiki la ideo, ke parolante saman lingvon la homoj interkompreniĝos, nuntempe tiu argumento nekonvinkigas. Antaŭ ol cent jaroj, ideologie regis la romantikismo kaj oni elpensis simplajn rimedojn por solvi la sociajn problemojn. Sed tiuj simplaj rimedoj lasttempe fiaskis kaj pro tio sekvis ĝenerala skeptikemo, kio faras, ke oni ne aŭskultu kiun ajn ideon aŭ ideologion. La predikado fariĝas vana, ĉar la homoj preterpasas kiun ajn ideologion eĉ se ĝi estas alloga.

Tamen, malgraŭ la fiasko de la ideologioj devenantaj de la romantikismo, oni ne povas esti indiferenta al la kolektivaj eventoj, des pli, ke nuntempe aperas denove forpasintaj ideologioj, kvazaŭ en la pasinteco oni povus trovi solvojn por la nunaj homaraj problemoj. Se la nacionalismo de la grandaj ŝtatoj preskaŭ formortis, anstataŭe burĝonas gentaj naciismoj, perfortemaj kaj pretaj militadi, kaj se tio neblas, uzi la terorismon. La manko de klara gvidideo por la irado voje al la estonteco faras, ke oni retrorigardu malantaŭen, kiel se tie troviĝus la perdita feliĉo. Sed tia percepto de la pasinteco ankaŭ estas romantikisma.

Nuntempe, oni komencas unuigi Eŭropon. Multaj ekonomikistoj kaj intelektuloj vidas la neceson de mondunuigo, sed la homamasoj ankoraŭ restas ankritaj al pasintaj pensoj aŭ pensas pri nenio ekster si. Unuaj nur pripensas pri si mem, tiuj estas la plejmulto. Aliaj pri sia regioneto por povi vivi laŭ tradiciaj moroj, kaj malmultaj aŭ preskaŭ neniu pri la neceso krei unuiginta homaro, solidara kaj kun ĝenerala respekto al la Homaj Rajtoj. Certe, la unuigon de la homaro estas la precipa defio de la nuntempo. Tiu unuigo jam ne estas romantika idealismo, sed neceso, kaj pro tio la agado unuigi la homaron fariĝas devo, devo de ĉiu kaj de ĉiuj, kaj en tio ni alvenas al la kerno de la esperantismo.

Malfacile iradas la Europa unuigo. Des malpli facila kaj eĉ nebla oni vidas la mondan. Kial? Ĉar la menso de preskaŭ ĉiuj homoj ne pripensas laŭ homara skalo. Jen agado por la esperantistoj: vastigi nian horizontan penson por povi kompreni kaj impulsi la homarunuigon. Sen tia mensoŝanĝo, sen tia kompreno,

neeblas volonta kaj libera homarunuiĝo. La kreataj institucioj ne germos en neadekvata grundo.

Jen la tasko de la esperantistoj: kulturi tiun grundon por ebligi la enkondukon de universala civilizacio. Kaj tiu tasko, kiu fariĝas devo, povas trovi kaj devas trovi multajn kunagantojn.

Tiel same al la interna ideo de Esperanto, kiel al la propra lingvo, atendas grandan sukceson: fariĝi la precipa kultura faktoro de mondunuiĝo, kaj en tiu tasko "nia diligenta kolegaro, en laboro paca ne laciĝos, ĝis la bela sonĝo de l'homaro, por eterna ben' efektiviĝos."

Giordano Moya

## Sub lupeo

Eŭropa Komunumo (EK) disponas en la Konsilantaro pri Parlamento kaj Komisionoj 4000 oficistojn. Inter ili, 741 estas simultanaj interpretistoj kaj 2000 tradukistoj. Nur por la kunvenoj de spertuloj oni bezonas 500 tradukistojn. En EK ĉiujare oni tradukas pli ol 1'5 milionon da paĝoj. Ĉiun paroladon de delegito oni tradukas en 9 lingvojn.

Unuigintaj Nacioj (UN) posedas nur 6 oficialajn lingvojn. Al UN apartenas 162 nacioj.

NATO nur havas 2 oficialajn lingvojn. Al NATO apartenas 16 landoj.



Ĉu vi ne trovis kion vi volis legi en via revuo? Vi povas simple verki artikoleton aŭ protestleteron kaj ni bonvole aperigos ĝin. Sendu vian materialon al nia poŝtkesto 864, 29080 Malago.

## Hispana Esperanto Muzeo

(Sant Pau d'Ordal, Barcelona)

Oni inaŭguris ĝin en 1968, okaze de la 10-a Barcelona Provinca Esperantista Renkontiĝo. Tiam la Muzeo situis en ampleksa ĉambro de apoteko, kie ĝia kreinto laboras kiel apotekisto.

Post kelka tempo de funkciado, ĝia Esperanto-materialo kolektita danke al la malavareco de la geesperantistoj, estis tiom abunda, ke oni decidis konstruigi novan domon, ekskluzivan por la Muzeo, kaj tiamaniere arigi la tutan materialon kolektitan en taŭga sidejo.

La nova konstruaĵo, situanta en strato Zamenhof, no. 12, ampleksas 250 kvadratajn metrojn, do sufiĉe granda. Ĝi konsistas el multaspaca salono, biblioteko, laborĉambro, granda kunvenejo, salono por vizitantoj kaj magazeno kun duplikatoj kaj cetera Esperanto-materialo disponeblaj por ilia eventuala interŝanĝado kun bibliotekoj kaj similaj institucioj, aŭ kun privataj kolektantoj.

Jam en marto 1984-a, la enhavo de la muzeo estis la jena:

Libroj en aŭ pri Esperanto	4557
Turismaj broŝuroj	1215
Jarkolektoj de gazetoj, konsistantaj el 3110 diversaj titoloj	3860
Proksimume 1700 skatoloj kun ne kompletaj jarkolektoj de gazetoj	19500
Skatoloj kun korespondaĵoj de diversaj esperantistoj	1864
Kongresaj insignoj	144
Porokazaj por kongresoj, ferioj, renkontiĝoj ktp	387
Esperantaj insignoj	207
Esperantaj poŝtkartoj kun teksto en aŭ pri Esperanto	1625
Standardoj de iamaj Esperanto-societoj	3
Diversdimensiaj flagetoj	19
Glumarkoj ne datumita; kun teksto en aŭ pri Esperanto	812
Gazetaj eltondaĵoj	725
Kalendaroj muraj, poŝaj, ktp.	112
Kongreslibroj	167
Murafiŝoj propagandaj, kongresaj, foiraj, ktp.	393
Moneroj	5
Vizitkartoj	257
Fotoj kaj kliŝoj pri esperantistoj kaj eventoj de la Movado	423
Diversaj memorigaĵoj	412
Manuskriptoj kun ne publikigitaj tekstoj pri verkaĵoj, paroladoj, ktp.	17
Propagandiloj, kiaj kraĵonoj, raziloj, ventumiloj, globkraĵonoj, skrapgumoj, skatoloj de tabako, ktp.	123

Krome ekzistas pli ol 15000 slipoj, listigitaj laŭ aŭtoroj, temoj kaj titoloj.

La muzeo havas 170 metrojn da bretoj kun 36817 pecoj. Cetere, en tiu ĉi listo ne estas enkalkulitaj la duoblaĵoj, pri kiuj la Muzeo posedas kelkajn milojn, por eventuala interŝanĝo kun bibliotekoj aŭ privataj kolektantoj, kaj 15 skatoloj kun pli ol mil paperaĵoj kiujn iom post iom oni klasifikas kaj ordigas. Kompreneble, la kolekto pligrandiĝas senĉese.

Telefonnumero: (93) 899 30 03.

## Poezia Angulo

### Verdaj Plendoj

La esperanta instruisto konstatas  
ke malbone la afero statas,  
ke la diligento  
forflugas kiel facila vento,  
ke la dek ses reguloj  
senlerne kuŝas en anguloj,  
ke la scio de la kompanio  
estas neta nenio  
ĉe la fino de la kurso...  
Kaj li murmuris kiel urso.

La esperanta propagandisto konstatas,  
ke liajn prezentadojn oni ne ŝatas,  
vanas la paroloj anemiaj  
freŝaj faktoj antaŭdiluviaj  
kaj multvorta nenidira stilo...  
Do li ploras kiel krokodrililo.

La esperanta eldonisto konstatas,  
ke lia monujo terure platas,  
ke librojn li ne vendas,  
ĉar la vera esperantisto,  
kun admirinda persisto  
neniam ion aĉetas aŭ mendas,  
nek amdelirojn de poetoj,  
nek revuojn aŭ gazetojn,  
malgraŭ ties malavaraj aroj  
da preseraroj.

Do admonojn pri libromendo,  
abonpago  
li ripetas kiel papago.

La esperanta grupkasisto konstatas,  
ke la grupa kaso fastadas,  
ĉar la membroj observas la devizon  
esperantistan,  
ĉioretistan:  
Neniam pagi kotizon!  
Tial do li, preskaŭ sen okupo,  
hurlas kiel maŝata lupo.

Sed ili plendu kaj plendu,  
nin, "kavalirojn de alta ideo"  
ilia plendo kaj veo  
neniel pro tio tentu,  
ke ni per lingvolerno nin turmentu,  
novajn propagandmetodojn inventu,  
gazetojn -eĉ propralandan- mendu,  
kotizon al la kasisto sendu,  
sed admonojn ni malatentu,  
nur krokodilu aŭ silentu,  
indiferentu,  
maldiligentu  
kaj restu bonaj esperantistaj tipoj:  
nin zorge gardu de labortroo,  
en la esperantista zoo  
ni estu la bradipoj.

Hilda Dresen



## Intervjuo

Ĉi-foje la Redakcio de G. A. intervjuas la Direktoron mem de la revuo. Jen la respondoj al niaj demandoj:

G. A. - Kiel kaj kiam vi esperantiĝis?

A. M. - Mi eklernis Esperanton en 1981 perkoresponde. Tiun Jaron la revuo *Muface* anoncis senpagan kurson kaj tuj mi kontaktis samideanon Ruiz Zaragoza, la delegiton de ILEI en Hispanio. Eble en tiu tempo li estis la unika persono kiu instruis la Internacian Lingvon perkoresponde. De ĉi tie mi dankemas al s-ro Zaragoza kaj al s-ro Bernabéu ilian subtenon kaj helpon.

G. A. - De kiam vi regas AEU?

A. M. - Kiel Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo mi postenis dufoje: la unua, tuj post la fondiĝo de la organizo kaj la dua, ekde oktobro de 1990. Kvankam tiu posteno postulas gravan penadon, mi laboras volonte. Ja, Esperanto tiel markis min, ke ĝi estas io nepra en mia vivo. Pri tio scias multaj samideanoj kiuj konas min.

G. A. - Supozeble, la andaluza esperantistaro ŝanĝiĝis lastatempe. Kia estas la nuntempa?

A. M. - Jes, vi pravas. Nova generacio malmergiĝas ne nur en Andaluzio sed ankaŭ en aliaj hispanaj Aŭtonomaj Komunumoj. Al la pasinta tre influita de "idealismo" sekvas nun alia signita de "realismon". Ŝajnas ke finfine la esperantistoj ekkomprenas ke ties internacia lingvo nur avancis per ilia propra penado. Nun estas necese, ke ĉiu agadu akorde kun tiu principo

G. A. - Via opinie, kiujn celojn devas atingi AEU en la venontaj tri Jaroj?

Disvastigi nian lingvon estas la fundamenta celo de nia asocio. Tiurilate, AEU klopodas senĉese varbi novajn gelernantojn ĉar memvideblas ke la lingvoj vivas per siaj propraj parolantoj. La lernado de la gepatraj lingvoj estas subtenata de la familio kaj de la socio en kiu oni aplikas ilin en la ĉiutaga vivo. Tamen, la lernado de Esperanto preskaŭ ĉiam okazas per la respondaj kursoj, ĉar ne abundas geedzoj kiuj parolas Esperanton hejme kaj en neniu lando oni aplikas ĝin senĉese en la ĉiutaga vivo. Instrui la lingvon kaj subteni ĉiun iniciaton aplikadi E-on en komercaj, kulturaj, ekonomiaj, politikaj, ktp kampoj estas la celoj de nia asocio.

G. A. - Ĉu la "interna ideo" validas hodiaŭ?

A. M. - Jes. La "interna ideo" estas la kerno de la Esperanta idearo. Tio ne signifas, ke la akcepto kaj teoria defendo de tiu principo sufiĉas kaj validas por sukcesi en la vivo. Oni devas konkretigi la ideojn per la aplikado. Ĝuste la forgeso de tiu devigo fare de tiam da revemuloj estas la ĉefa kaŭzo de la indiferenteco de la socio pri nia lingvo. La aplikado estas la plej grava pruvo de la taŭgeco de io. Mi defendas la validecon de "la interna ideo" kaj samtempe mi postulas la plej vastan aplikadon de la lingvo. Socio sen ideologio ne akordas kun la spiritaj postuloj de la homo. Pragmatismo forgesanta la sentojn kaj la solidarecon estas memmortiga.

G.A. - AEU klopodas senĉese por ke niaj samideanoj plibonigu sian propran E-kulturon. Sur kio baziĝas tiu klopodo?

A.M. - Tute simple: sur la nepreco plej kapabliĝi por la nuligo de influoj kontraŭaj al la disvastigo kaj aplikado de E-o en nia socio. La afero estas tiel grava kaj la tasko tiel impona, ke se en la Movado ne agadas aŭtentikaj kapabluloj, la mondo ne fidus nin. Do, celo de ajna serioza Esperanta organizo devas esti starigi strategiojn taŭgajn por varbi aktivulojn kaj kapabliĝi ilin fakte.

G.A. - Lastatempe, iom post iom, fortiĝas opinio laŭ kiu Esperanto utilas por perlabori la panon. Vi mem instigas ĉiujn partopreni en tiurilataj agadoj. Kial tiu agadmaniero?

A.M. - Pro ĉi tio: a) pruvi al la nemovadanoj la utilecon de la lingvo; b) kuraĝigi la esperantistaron; c) gajni monon kaj prestiĝon. Mi ripetas kion mi diris pli antaŭe en ĉi tiu intervjuo: la aplikado estas nepre. Kaj nun mi aldonas: la sukceso de la aplikado de E-o tute dependas de nia informado. Ni devas informigi kaj informi la ceterulojn.

G.A. - Kion pri turismo?

A.M. - Bonsorte la uzo de E-o en ĉi tiu kampo estas reala. Ekzemploj: la agado de *Esperantotur*, la ekskursoj kaj restadoj faritaj per E-o kaj en E-a etoso, la kontaktoj kun vojaĝagentejoj; kiuj proponas kunagadi kun asocioj kaj aktivuloj esperantistaj... Al tiuj kiuj dubas pri la ebleco sukcesi en turismo per E-o, mi diras ke nur la esperantistoj defetistaj frakasis en ĉi tiu tereno.

G.A. - Kion pri tradukado?

A.M. - Mia respondo estas simila al la antaŭa. Ja, hodiaŭ estas esperantistoj kiuj gajnas monon tradukante el naciaj lingvoj en E-on, aŭ el Esperanto en alian lingvon. Estas iniciatoj por grupigi la tradukantoj/-intoj kaj serĉi laboron por ili. Eh AEU mem estas personoj kiuj prizorgas ĉi tiun aferon. Interesitoj, do, kontaktu la estraron sciigante pri siaj interesoj.

G.A. - Kion pri komercaj agadoj?

A.M. - Temas pri unu el la agadoj plej satataj de mi. Ĝuste pro tio, la pasintan jaron mi kontaktis per letere s-ran Schubert (el *Monda Merkato*) kaj Imre Bajaki (el *Sortimento*). La aperigo de la rubriko "Esperanto Aplikata" en ĉiu numero de *Gazeto Andaluzia* estas vera pruvo de la graveco de la afero. Espereblas pliaj avancoj en la aplikado de E-o inter komercistoj. Tamen, mi ripetas ankoraŭ foje, la sukceso dependas de vi mem.

G.A. - Entuziasma, kabeisma, defetisma, realisma... Kia estas estas la sinteno de la hodiaŭa esperantistaro?

A.M. - Eble mi eraras. Tamen mi opinias ke la nuntempa esperantistaro karakterizas sincera deziro provi novajn strategiojn por antaŭeniri sian lingvon. Almenaŭ inter la aktivuloj, aperas tia sinteno. Tamen estas bedaŭrinde ke plej ofte la penado okazas nur en la humanismaj kampoj.



G. A. - Kutime la esperantistoj ŝatas la oficialan subtenon de la registaroj nepre por progresigi Esperanton. Kia via opinio tiurilate?

A. M. - Ke ni devas profiti ĉiun ŝancon kaj, kompreneble, la subtenon de la politikistoj por sukcesigi E-on. Tamen estas nepre, ke ĉiu el ni agadu sen la espero de tiu subteno. Alie, la politikisto mem rifuzos nin ĉar, se li ne estas esperantisto, alvenas al ni nur por iamaniere pravigi sin, ne por defendi senpage nian lingvon.

G. A. - Dankon, Andreo.



### Tutmonde (Pacifista Movado)

Tiu tutmonda pacifista Movado fondiĝis en januaro 1985, post la aprobo de ĝia Statuto fare de grupo de personoj el Eŭropo kaj Ameriko, devenantaj de Humanisma Movado kaj de Esperantismo. Ĝiaj celoj estas: Kontraŭstarigi perfortojn kaj militojn; elradikigi mizeron; impulsi starigon de Monda Konstitucio kaj Federacio de Popoloj por defendi pacon, liberecon kaj Homajn Rajtojn; certigi por iuj indan vivadon, ŝirmitan kontraŭ senlaboreco per socipolitika organizado; agnoski la rajton de ĉiu komunumo sendependigi sin aŭ sin federaciigi kun aliaj ŝtatoj; defendi la naturan medion per ekologia protekto; klopodi por disvastigi Esperanton.

Estas du kategorioj de membroj: efektivaj (tiuj kiuj estas enskribitaj en Adresaro), kaj Protektantaj (tiuj kiuj ne konsentas, ke oni publikigu ilian nomon). La organizon regas tripersona Sekretariato elektita per referendumo. En landoj kun pli ol 25 Efektivaj membroj, eblas starigi Nacian Komisionon. La Sekretariato povas nomumi naciajn kaj urbajn delegitojn.

Dum la tagoj 9-16 de la venonta oktobro okazos en Sant Cugat del Vallès (Hispanio) la unua Kunveno de Tutmonde. Ĝi ne estos kongreso. La Sekretariato orientas la agadon. Oni povas prezenti proponojn por publikigi ilin en KUNE, organo de Tutmonde. Jen kelkaj el la temoj studeblaj: La homo kaj la ocio, Idealisma teniĝo, Politikaj akceptoj, Estonta Perspektivo, "Tutmondisma" Movado...

Adreso: Tutmonde, Poŝtkesto 313, E-08220 Terrassa, Hispanio



## Iluzii

Danke al la gentileco de samideano J. Abeledo kiu sendis ĝin, alvenis al miaj manoj traduko en la kastilian lingvon de LA LINGVA PUZLO, artikolo originale verkita de Bernard Cassen. Publikigis ĝin la gazeto *Cuatro Semanas y Le Monde Diplomatique*, la 23-an de marto, 1993. Kvankam en tiu verko, oni parolas neniom pri Esperanto, ĝia enhavo tiom rilatas silente al nia internacia lingvo, ke estas nepre fari la respondajn komentariojn.

Unuavice evidentas, ke ankoraŭ (kaj supozeble en la estonto) estas personoj kiuj preterlasas ajnan solvon kaj proponon se ĉi tiuj ne devenas de la oficialaj institucioj de la ŝtatoj. Tial Bernard Cassen plendas ke ankoraŭ ne troviĝis taŭga rimedo por defendi la naciajn lingvojn kontrŭ la atako de iuj el ili kiuj progresive kaj preference estas uzataj ene de la Eŭropa Komunumo. Bedaŭrinde ŝajnas, ke li ne konas sufiĉe la politikajn grupojn de EK; alie, li scios pri la ekzisto de la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo kaj ties proponoj. Neniom diri pri ĉi tiuj estas tre sintome.

Nuntempe, akorde kun la Roma Traktato estas naŭ oficialaj lingvoj en EK kaj, supozeble, tiu nombro pligrandiĝos en la estonto. Tamen, ĉar praktike la laborlingvoj de la funkciuloj preskaŭ ĉiam estas la franca kaj la angla, la germana registaro ĉagreniĝas pro tio, ke lia lingvo ne havas saman rangon en la Komunumaj Institucioj. La nuntempa lingva politiko ne estas eltenebla longdaŭre kaj, post la solvo de la ekonomiaj problemoj, tre probable eksplodos. La situacio malboniĝos ankoraŭ pli, se aliaj landoj kiel la Ĉeka Respubliko, Finnlando, Svedujo, Norvegio, Aŭstrio, Pollando, Hungario kaj Svisio finfine integriĝos en EK.

En la klopodoj starigi iun solvon al la problemoj devenantaj de la principo de egaleco, triumfas ĉies egoismo, fronte al solidareco: anstataŭ akcepti neutralan proponon kiel la Esperantan, oni elspezas imponegajn monkvantojn en la instruado de la oficialaj lingvoj de la landoj-membroj opiniante ke tiesmaniere ĉies lingvorajtoj estas defendataj. Ja, en ĉi tiu tereno la hipokriteco estas tiel maldelikata, ke naŭzas.

La blindeco de B.C. daŭras kiam por solvi la situacion, proponas agadi samkiel en la Eŭropa Konsilio, t.e. rekoni nur du lingvojn. Tiel estu, ke tia sugesto ne triumfu! Alie difektiĝos gravege la esenco de Eŭropo, ĉar Eŭropo ne estas tia se mankas al ĝi la lingva pluraleco subtenanta la kulturalan diversecon. Tamen ne estas maleble ke tio okazos. La koncepto "altruismo" estas rifuzata kiel malutila. Hodiaŭ oni parolas pri "solidareco" kaj samtempe, malgraŭ kaŝe, oni serĉas la propran profiton. Ja, oni defendas solidarajn principojn nur por certigi la propran avantaĝan situacion. Tial la obstinega sinteno de la politikistoj kiuj rifuzas la Esperantan solvon kaj defendas la amasan lernadon de la naciaj lingvoj (principe, ĉiuj!) de la landoj apartenantaj al EK.

Alia temo pritraktita de B.C. en la artikolo estas tiu de la neŝtataj lingvoj parolataj en la landoj apartenantaj al EK. Tiurilate li diras: "...ke la plej fervoraj defendantoj de la regionaj lingvoj sukcesas malutili al sia propra afero per unu aŭ alia rimedon". Por pruvi tion, referencas la konduton de la regionalismaj francoj kiuj petas ke la nacia registaro rekonu plene iliajn proprajn lingvojn. Li diras ke "ne komprenas kiamaniere la plena rekono de la regionaj lingvoj bremsus, ĉefe en



Parizo, la emecon al "tout-anglais..." Tuj poste li aldonas ke "laŭ iuj francaj regionalistoj, la unika kaj aŭtentika lingva danĝero estas la franca lingvo

Ŝajne, B.C. inkluzivas tiajn pricerbumojn por defendi sian propran prilingvan kriterion konsiderinte la pliigon de la problemo, se la nombro de oficialaj lingvoj de EK pligrandiĝus post la rekono de la neŝtataj lingvoj parolataj en la landoj-membroj. Tia sinteno ne surprizigas min, ĉar laŭ B.C. ne eblas akordigi la egalecon de la lingvoj kaj la efikecon de la agado ene de EK. Tial li sugestas du solvojn: a) ke oni instruu tri idiomojn (krom la denaska), akorde kun la propono esprimita de Joseph Rovin en sia eseo *Citoyen d'Europe. Comment le devenir?*, kaj b) ke la tradukaj agadoj pliigu ege. Kompreneble, mi akceptas nenium el ili, ĉar estas tria solvo vere kontentiga, t.e. la uzo de Esperanto.

Jes, estas certe ke la nombro de lingvoj estas impona baro minacanta la prosperon de EK. Tamen, ankaŭ estas certe, ke la problemo restas, kvankam oni akceptu nur naŭ lingvojn. La aferoj kiuj tiel timigas B.C., estas solveblaj. Tamen, ĉar li kaj aliaj personoj opinias sin tute kapablaj kiam ili akordas kun la oficialaj principoj de la institucioj, malesperas kiam ili ne eltrovas en tiuj medioj kontentigon al la postuloj de la socio.

Kiam ili ĉesos ŝati sin la umbiliko de la mondo?

Andrés Martín

## La Fenomeno Cheste

Mi multfoje aŭdis paroli pri la rilatoj inter Esperanto kaj tiu-ĉi vilaĝo de Valencio sed ĝis nun mi persone ne vidis la "fenomenon Cheste-n". Tio okazis dum la kongreso de Valencia Esperanto -Federacio (1-2, majo). La programo, kvankam malgranda, estis kompleta, malteda kaj bone organizita pere de la loka grupo *Lumradio*. En la kultur-domo mi renkontiĝis kun esperantistoj kaj tie-ĉi ni povis viziti interesan libroservon (kie unufoje oni vendis publike la libron *Esperanto: fenomeno de la comunicación* eldonita de Madrida Esperanto-Liceo). Mi aplaudas Luis Fernández kiu translokigis HEF-libroservon al tiu renkontiĝo por montri novaĵojn kaj klasikajn librojn. Ankaŭ oni inkludis viziton al kooperativo de vinkeloj kun gustumado kaj donaco de diversaj vinoj de la regiono. Poste, en la urbodomo, la urbestro prezidis kunvenon kaj faris omaĝon al kelkaj malnovaj kaj maljunaj esperantistoj kiuj persone aŭ reprezentitaj ricevis memorplaton.

Sabate la programo finiĝis per prelego titolita *Kvin vojaĝoj tra la mondo*, belege planita, ne tro longa kaj tre originala ĉar temis pri kvin manieroj ĉirkaŭigi la teron kiuj alportis progreson al la homaro: 1-a, disvastigado, el Afriko, de la homo mem en la prahistorio; 2-a, ĉirkaŭigi ŝipe la terglobon en la 15-a jarcento; 3-a, la vojaĝo de la ondoj kiuj elsendas sonojn, bildojn kaj parolojn tra la mondo; 4-a, satelitaj orbitoj kiuj permesas ĉirkaŭigi teron en spaca perspektivo, kaj la 5-a, ankoraŭ ne finita, la paroloj kiuj povas ĉirkaŭrondi nian planedon speciale se ĉiuj parolas saman lingvon. La sekvintan tagon, dimanĉon, ni promenis tra la urbo (s-ro urbestro inkludita) kaj dum tiu promonado mi povis konstati la "fenomeno Cheste" propraokule. Antaŭ kelkaj jaroj ekzistis generacio de ĉestanoj kiuj parolis Esperanton. La semo estis forjetita precipe de du personoj, la s-roj Máñez kaj Arnau kaj forte enteriĝis kaj kreskis. Ne gravas se multaj jam forĝis paroli

Esperanton; la humanisma ideo kaj la uzado de la internacia lingvo por paroli kun eksterlandanoj ankoraŭ restas en preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj. Multaj el ili ankoraŭ rememoras kiel siaj prauloj uzis Esperanton por interkomprenigi kun la aŭstriaĵ infanoj rifuĝintaj en Cheste dum la unua mondmilito. Hodiaŭ la junuloj de Cheste havas la grupon *Lumradio* por daŭrigi laboron favoran al Esperanto kaj kiel memoraĵo de siaj prauloj du stratoj alportas nomojn de esperantistoj, kelkaj muroj havas verdajn stelojn kaj D-ro Zamenhof havas memortabulon kaj straton. S-ro Urbestro, gesinjoroj kaj geesperantistoj de Cheste, Dankon!

Lupe

## Politiko kaj Esperanto

Pro la graveco de la afero, ni aperigas la jenajn gazetajn eltondaĵojn. Ili devenas de *La Partio Nova*, marto 1993, paĝo 11, ka; rilatas rekte al Radikala Partio kaj Esperanto. Bedaŭrinde, pro manko de spaco ne estis eble publikigi ilin en la junia numero de *Gazeto Andaluza*.

*La Rajto je la Lingvo.* - La temo pri la "lingva demokratio", kaj aparte pri Esperanto, estis diskutata en la kadro de unu el la Komisionoj de la Kongreso, kune kun tiu pli ĝenerala pri "federisno kaj minoritatoj, naciecoj civilaj kaj politikaj rajtoj, rajtoj de la minoritatoj". En tiu ĉi komisiono, prezidata de Erno Borbely, iama deputito ĉe la rumana Parlamento, kaj Sandro Ottoni, federa konsiliano de RP, intervenis pri tiu ĉi temo, inter aliaj. Ferenc Csubela kaj Anton Skenderovich, deputitoj ĉe la serva Parlamento; Kolio Paramov, bulgara deputito; Vjekoslav Zuhaj, deputito ĉe la kroata Parlamento, membroj de la parlamentanoj de RP. En la Kongreso intervenis Relmar Frank, direktoro de la Instituto de Kibernetika Pedagogio de la Universitato de Paderborn, aliĝinto al RP.

*En la Parlamento.* - Danke al la Rezoluci-propono prezentita de Luigi Vertemati, socialista eŭrop-parlamentano, aliĝinta al RP, kaj de Marco Pannella en aŭgusto 1992, la Eŭropa Parlamento decidis okazigi enketon pri la ebleco ke Esperanto faciligu la lernadon de fremdaj lingvoj (metodo de Paderborn). Eh Italio estas starigita la federista intergrupo pri la lingvo kaj por reformado de la lingva politiko. Aliĝis 36 parlamentanoj, el ĉiuj politikaj grupoj, escepte de la ekstrema dekstro.

Estis ĉirkaŭ 350 la esperantistoj, loĝantaj en 30 landoj, aliĝintaj al RP de 1992. Inter tiuj: Andrea Chiti Batelli, iama sekretario de la italaj parlamentoj delegitaroj ĉe la Eŭropaj Asembleoj ka; Prezidanto de ERA, la esperantista radikala asocio, kiu nombras aliĝintojn en multaj landoj de la mondo; Hans Herasmus, kunordiganto de Eŭropa Esperanto-Unio; Fabrizio Pennachietti, vic-prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj, prezidanto de la Itala Instituto de Esperanto; Emilia Lapenna, verkistino, historia figuro de la internacia Esperanto-movado, fondinto en 1945 de la Kroatia Esperanto-Ligo. Ni volus ke la esperantistoj disaj tra la mondo, ricevantaj tiun ĉi gazeton, komprenu ke ilia ideo povas sukcesi nur se ĝi trovas la instrumenton, la politikan organizaĵon, kiu engaĝas sin pri la problemo de la lingva demokratio.

La rajto je la lingvo ne estas absoluta rajto. En la kampo de la internaciaj komunikoj la rajto je la lingvo fariĝas teoria rajto. Tial internacia lingvo estas necesa. Hodiaŭ ĝi estas la angla, hieraŭ ĝi estis la franca, la latina, morgaŭ eble ĝi estos alia lingvo. Tial, finfine, neŭtrala kaj artefarita lingvo estus la ideala kiel



internacia idioma. En la nacia kadro estas necese, ke la ŝtatoj agnosku la rajton je la lingvo kiel fundamentan, kaj multaj projektoj estis kaj estos faritaj por redakti universalan deklaron pri la lingvaj rajtoj. Jam la art. 27 de la internacia pakto de 1976 agnoskas al la lingvaj minoritatoj la rajton uzi sian lingvon. Tiu internacia pakto, same kiel la deklaro pri la homaj rajtoj de 1948, malpermesas ĉiun lingvan diskriminacion. Jam ekzistas internaciaj dokumentoj iasence favoraj al la rajto je la lingvo. Ankoraŭ ne ekzistas universala deklaro pri la lingvaj rajtoj, eble tial ke la ŝtatoj timas, ke ĝi povas fragmentigi ilian politikan kaj nacian unuecon.

"...La ĉarto pri kiu mi parolis, kiun ni faras kiel Unesko, kvankam ĝi ne estas oficiala dokumento de tiu organizaĵo, estas projekto de la internacia federacio de la asocioj de instruistoj pri modernaj lingvoj.

*El intervjuo al Joseph Turi, kanada profesoro kaj advokato, Ĝenerala Sekretario de la Internacia Akademio pri Lingva Juro.*

## 10 Sciindaj aspektoj pri...

### Aliaj internaciaj lingvoj

1. Ne estas ĝuste aserti ke Volapük estis internacia lingvo, ĉar nuntempe ankoraŭ ekzistas, vere ne amase disvastigata, sed almenaŭ grupeto da parolantoj, aŭ pli bone diri, skribantoj, kiuj praktikas ĝin. Ne temas pri la originala formo de Schleyer, sed alia perfektigita de Arie DE JONG. Eĉ ekzistas metodo por la esperantistaro, *Gramat Smalik Volapüka medü pük Esperanto ko Vodem Brefik*.
2. Eblas legi revuojn en aliaj internaciaj lingvoj, jen kelkaj ekzemploj: en Ido, *Progreso*, *Ido-Vivo*; en Interlingua, *Panorama*, *Unir*, *Lingua e Vita*, *Vias Boreal*; en Vikto, *Viktoblatt*.
3. En Hispanio ekzistas ankaŭ organizaĵoj de aliaj internaciaj lingvoj, tamen tre minoritataj: Hispan Ido Societo kaj Instituto Espaniol de Interlingua.
4. Kongresumi ne estas nur E-kutimo, la interlinguistoj renkontiĝas ĉiu dujare, ĉi somere en Nederlando, kaj ankaŭ la idistoj organizas internacian kunvenon ĉiu dujare. Same la brazilaj kaj la skandinavaj interlinguistoj organizas regionajn renkontiĝojn.
5. La lasta internacia lingvo nomigas *Unitario* kaj estis ellaborata de la ĝermano Mario PLEYER en 1990; ekzistas libro-metodo por lerni ĝin: *Unitario per medio de picturoyn*. Jen frazo en ĉi tiu nova lingvo: Ego un sombrero tenas in la mano, ego semismo donaros al kvista donina (*Mi havas ĉapelon en la mano, mi mem donos ĝin al ĉi tiu sinjorino.*)
6. La plej informriĉa centro pri internaciaj lingvoj troviĝas en Svisio, en La Chaux de Fonds, temas pri la *Centro de Dokumentado kaj Esploro de la Lingvo Internacia*. Ĝi posedas la plej bonan bibliotekon pri la temo, organizas konferencojn kaj kelkfoje eldonas publikajojn.
7. Nuntempe parolantoj de aliaj internaciaj lingvoj tre bone interrilatiĝas unuj la aliajn, kelkfoje eĉ esperantisto parolas Idon, Interlingua, Vikton, ktp. Sed pasintece ĉi tio ne estis tiel, eĉ en la Statutoj de la Akademio de Esperanto oni povas legi ke ĝi naskiĝas por eviti la influon kaj disvastigon de la Esperanto reformita Ido.
8. En la hispana lingvo ekzistas vortaroj de aliaj internaciaj lingvoj, en la sesdekaj jaroj estis publikitaj de

la Hispan-Ido Societo vortaro *Español-Ido* kaj ankaŭ alia *Ido--Español*. Pri Interlingua ne ekzistas abunda vortaro, nur broŝuro, kvankam oni preparas grandan vortaron *Español-Interlingua*.

9. Lastatempe, la *Union Mundial pro Interlingua* kaj sia *Servicio de Libros* oferas novajn verkojn originalajn kaj tradukitaj en Interlingua; krom libro-metodoj en multaj naciaj lingvoj


troveblas ankaŭ literaturajoj kiel *Septe Contos de H. C. Andersen*, *Psalmos e Canticos*, *Versos Grec II*, ktp.

10. Foliumante la *Adressario de Interlingua* (Adresaro de Interlingua) aperas kelkaj personaj kiuj ankoraŭ kapablas paroli en internaciaj lingvoj kiujn ĉiuj jam kredis forgesitaj, kiel Occidental, Neo aŭ Novial.

J. M. R. H.

## Amuzajoj

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11



Horizontale:

1. Konsonanto. 2. Inverse, poseda adjektivo. 3. Inverse, deziro ke iu estu tuj farita. 4. Femalo. Inverse, prepozicio. 5. Inverse, nomo de litero. Rilata al muo. Nomo de litero. 6. Granda en vertikala kaj suprenira direkto. Konsonanto.

Ĉiu el la du flankoj de paperfolio, sur kiu oni skribas. 7. Vokaloj. Piedvesto. Inverse, Sufikso montranta inklinon. 8. Pronomo. Ĉina mezurunuo. 9. Grasa. 10. Membro de iu asocio. 11. Vokalo



Vertikale:


1. Vokalo. 2. Grekdevena scienca vorto signifanta orelon. 3. Eskima loĝejo. 4. Sufikso por derivi numeralojn. Vokalo. Sufikso signifanta loĝanton de loko. 5. Inverse, rilata al moto.

Navigebla akvoveturilo. 6. Inverse, refleksivo akuzative. Numeralo. Femalo. 7. Inverse, rilata al aro, akuzative. Maljuna. 8. Interjekcio. Konsonanto. Vokalo. 9. Iu granda platboato. 10. La segmento de rekto kamuna al du apudaj edroj. Vokalo.

Kaj jen la solvoj de la krucvortoj de la lasta numero de *Gazeto Andaluza*.



Kiel sciante, ni lotumis librojn inter tiuj kiuj sendis al ni la solvon de la krucvortoj. Tia donaco (la libroj *Ŝtupoj sen nomo*, de Baldur Ragnarsson, kaj *Pinta kraĵono*, de Reto Rosetti) baldaŭ ricevos hejme nia samideano **Rafael Sepúlveda Bernal** el Koin' (Malago). Gratulon, Rafael!



Denove ni lotumos libron inter la solvantoj de la krucvorto de ĉi tiu numero de *Gazeto Andaluza*! Ĉi-foje la aŭtoro estas Georgo Kamaĉo, la juna hispana samideano, membro de Akademio de Esperanto. La limdato estas la 15-a de novembro. Sendu la (korektajn) solvojn al la redaktoro, J. F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago.

## Pri la Esperantigo de la Nomoj

- Jen konsultenda bibliografio verkita en Esperanto pri ĉi tiu diskutita temo:
- Gumà, Salvador (1972): "Pri la landnomoj", en *Horizonto*, vol. 4, n-ro 23 (5).
- Kalocsay kaj Waringhien: *Plena Analiza Gramatiko*.
- Pereira de Souza, Delio (1981): *Brazilaj geografiaj nomoj*.
- Briano, Johano-Baptisto (1972): *Esperanto-Lingva Muzika Leksikono*.
- Plena Ilustrita Vortaro*.
- Plena Vortaro de Esperanto*.
- Sekelj, Tibor (1968): *Mondmapo*.
- Urban, Erhard (1958): "Gastronomia Terminaro", en *Jarlibro 1958*.
- Vilborg, Ebbe (1961): "Esperantigo de grekaj nomoj", en *Esperantologio*, vol. 2, n-ro 2.
- W. Gilbert: *Pri landnomoj en Esperanto*.
- Kawasaki, Naokazu (1950): "Esperantigaj principoj de japanaj vortoj" en *Esperantologio* vol. 1, n-ro 2.
- Kavka, Josef (1978): "Esperantigo de ĉekoslovakaj loknomoj", en *Scienca Revuo*, vol. 29, n-ro 3.
- (1981): "Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantigon", en *Kolekto de la Referaĵoj de konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tefniko*
- Golden, Bernard (1979): "Nova tasko por la Akademio: reguloj plor la esperantigo de etnolingvaj vortoj", en *Dia Regno*, n-ro 6, junio.
- (1982) "Kvebraĵo aŭ kebraĉo?" en *Boletín de HEF*, vol. 20.
- (1987) "Principoj por la Esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj", en *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo, Esperantismo*.
- (1985) "Transkribo de la hispana fonemo ll en Esperanto", en *Boletín de HEF*, vol. 23.
- (1984) "Kial mi skribis Gŭadiano anstataŭ Gvadiano", en *Boletín de HEF*, vol. 22.
- Mi, Lorenc' (1984): "Kontribuo al la Esperanta Toponimiko, proponitaj landnomoj", en *Akademias Studoj*, 1984.
- Moritz, Uwe Joachim (1971): *Problemoj de etnaj minoritatoj en Hispanio*, Nurenbergo.
- Albault, André (1983): "Kontribuo al la Esperanta Toponimiko", en *Akademias Studoj*, 1983, Bailieboro, Ontario, Kanado.
- Régulo Pérez, Juan (1949): "Hispanidaj neologismoj en Esperanto", en *Esperantologio*, vol. 1, n-ro 1.
- Wouter F. Pilger (1987): "Problemoj de esperantigo de nederland(lingv)aj loknomoj" en *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo, Esperantismo*.
- Seppik, H. (1974): "Propraj nomoj en Esperanto", en *Scienca Revuo*, 25 2/3.
- Stop-Bowitz, Carl (1987): "Biologiaj namenklaturaj kaj ilia esperantigo", en *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo, Esperantismo*.
- (1963): "Kiel nomi la organismojn?", en *Scienca Revuo*, 13. -(1971): "Zoologia Nomenklaturaj", en *Scienca Revuo*, 22.
- De Smet, W. M. A. (1959): "La polipteroj, strangaj afrikaj fiŝoj", en *Scienca Revuo*, 11, pp. 117-119.
- (1963): "Konsideroj pri la Biologia Nomenklaturaj", en *Scienca Revuo*, 13.



-(1971): "La nomoj de la cetacoj", en *Scienca Revuo*, 22.

Neergard, P. (1963): "La lingvaj problemoj en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj", en *Scienca Revuo*, 13.


*Poŝatlaso de la mondo* (1971), Kartografie n. p. Praha.

## Ĉu la artoj troviĝas en dekadenco?

Mi ne estas fakulo pri la temo, sed kiel kiu ajn persono mi ankaŭ havas mian opinion rilate al la artoj. Mi jam scias, ke la vorto *artoj* estas tre ampleksa kaj ke artoj estas multaj kaj tre diversaj.

Almenaŭ hodiaŭ mi celas la pentran arton. Ĉiu el vi rigardis pentraĵon, kiun vi ne komprenis. Tio jam okazas tre ofte al mi. Do, estas du aspektoj, aŭ la pentristo estas tre inteligenta, aŭ mi estas tre analfabeta en ti kultura faceto. Mi ĉiam pensis, ke la pentrarto estis la maniero kapti la diversajn aspektojn de nia vivo kaj ilin eternigi pere de tiu instruiga sistemo.

Lastatempe, ŝajnas ke io ŝanĝiĝas, ĉar mi vidas pentraĵon, kiuj havas nenan signifon, ekzemple: granda tolaĵo nur unukolora, kaj en kiu ekzistas nenia desegno. Mi jam tre atente rigardadis la *pentraĵon* kaj mi laborigis mian personon por scii, kion signifas tiu pentraĵo, aŭ kian mesaĝon mi povas trovi en ĝi. Post longa rigardado kaj pensado, mi venis al la konkludo, ke mi ne scias, ne povas kompreni la celon de la artisto.



La kvaliton, mi ankaŭ ne komprenas. Pentri tolajon tiamaniere jam povas fari kiu ajn persono. Sendube estas pli malfacile pentri muron. Estas aliaj pentristoj kiuj estas iom pli inteligentaj, kaj en la tolajon metas du aŭ tri kolorojn. Fakte ĝi ne fariĝas tiom monotona, sed la mesaĝo restas nekomprenebla. Estas ankoraŭ aliaj ankoraŭ iomete pli kuraĝaj kaj mezen de la pentraĵo metas iujn makulojn diverskolorajn. Tiel almenaŭ ni povas pensi, ke tute ne intence la pentristo faligis tien la penikon. Poste venas aliaj, kun strangaj desegnaĵoj kaj farboj, kiuj praktike diras nenion. La valoro de tiuj pentraĵoj estas sensignifa, sed la kuraĝo de tiuj pentristoj ilin subskribi havas nekalkuleblan prezon.

Sed la pinto de ĉi tiu arto estas for de la imago por normala homo. Nun vi jam scias; niaj pentristoj ne bezonas farbojn. Ili algluas al tolaĵo, kiun ajn ĉifonaĵon, ŝnuretojn kaj objektojn trovitajn en la rubejo. Kaj jen, ni havas alian pentraĵon. Ili ne hontas pri tio kaj ankaŭ kuraĝe ili ekspozicias ĝin. Mi ne scias, kiam finiĝos tiu dekadenco.

Tamen ankoraŭ oni povas iri pli malproksimen en tiu arto: vi jam scias, ke kataluna pentristo decidis plenigi malpuran kaj rompitan ŝtrumpon per pajlo kaj ĝin ekspozicii, kiel la plej grandan verkon.

Ni jam vidas, ke la inteligenteco kaj *kuraĝo* de la homo ne havas limojn.

Kion dirus Velázquez, Murillo, Leonardo da Vinci kaj multaj aliaj klasikaj pentristoj, se ili estus revivintaj?

Alia afero nekomprenebla, almenaŭ por mi, estas tiuj modernaj pentristoj vendantaj tiujn absurdajn pentraĵojn, kiuj famigas ilin. El tio mi eltiras la konkludon, ke ankaŭ dekadenco invadis la guston de la nuntempaj aĉetantoj. Nuntempe la homo estas sen ideoj; ĉiu celas la facilecon, kaj la pentra arto estas specimeno, kiu montras la mankon de kulturo.

Mi esperas, ke tiu manio al tiu stranga pentrado baldaŭ forpasos, kaj ke la historio montros al niaj posttempuloj tiujn pentraĵojn kiel strangan kaj nekompreneblan esprimon de certa epoko en la homa historio.

Tamen, io estas ege interesa pri tiu pentrosistemo, kiam la kritikistoj devas analizi la verkon. Kiajn esprimojn ili uzas, kaj kiom da stultaĵoj ili diras.

Eĉ de la plej fama pentristo mi ne akceptus, eĉ donace, similan pentraĵon.

Luis Serrano Pérez

## Niaj Legantoj Parolas

Mi plezure legis la unuan numeron en 1993 de *Gazeto Andaluzia* kaj ege ŝatas mi la ŝanĝojn enkondukitajn. Tre bona ideo ŝajnas al mi la nova sekcio *Esperanto Aplikata*. Oni vidos per ĝi ĉu nia lingvo vere taŭgas en la nunaj cirkonstancoj kiel merkata perilo. Domaĝe opinias mi ke Esperanto ne estas sufiĉe disvastigita inter la entreprenistoj en Andaluzio, do oni ne antaŭvidu grandajn ekonomiajn profitaĵojn por la eksterlandaj firmaoj kiuj anonciĝas sur la paĝoj de *Gazeto Andaluzia*. Cetere tre interesa estas la artikolo *Politiki* kaj egale interesoplena kaj pensiga estas *Kongresi*. Per *Gazeto Andaluzia* oni ne nur informiĝas pri eventoj esperantistaj okaz/int/ant/ont/aj en Andaluzio, sed ankaŭ oni pligrandigas siajn konojn pri diversaj aspektoj de nia Movado. Klerigi la legantojn de *Gazeto Andaluzia* ja estas bonveninda tasko!

Franĉjo Robles



## Esperanto Aplikata

**Samideano:** Jen la ŝanco atendita de multaj. Ganu monon per Esperanto! *Mono* estas gazeto por tiuj kiuj ŝatus honeste gajni multan monon! La gazeto havas interesajn artikolojn pri eblecoj gajni monon, kaj pri pliefikigo de agadoj, kies celo estas bonigo de financa situacio. Krome en ĝi estas anoncoj pagitaj. Ĝi aperas kvaronjare, jara abontarifo estas 30 guldenoj por la riĉaj, 15 guldenoj por la malriĉaj landoj. Disvastigo okazas laŭ multnivela enmarketigo, kie jam mem estas potenca ebleco profiti multe! Petu la ekzempleron 1993/1 kontraŭ 3 IRK aŭ USD ce Agentejo SORTIMENTO, Kishunfélegyháza, pf. 138, H-6100 Hungario. (La ekzemplero enhavas ĉiujn necesajn informojn kaj abonkarton. Tujan abonon ne faru, nur abonu post la tralego de la provekzemplero!).

Mi vendas loĝejon en Malago, en kvartalo Carretera de Cádiz, 4-a etaĝo, kvar ĉambroj, kuirejo meblita, enmuraj ŝrankoj, blendita pordo, ĉio alumina. La loĝejo disponas propran telefonon. Prezo 6600000 pesetoj. Kontakto ĉe: 958-258134 (de la 8-a ĝis la 10-a), 95-2315337, 95-2350930 (en aŭgusto). José Matos de Castro, Correos Entrega Inmediata, 18070 Granada.

**Survoje**, dumonata revuo de Unuiĝo por Novtipa Internacia Kulturo. Tre interesaj artikoloj de esperantistaj gravuloj. Perantoj en pli ol dudek landoj. Peranto en Hispanio: Andrés Martín González, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Nia firmao produktas reviran gluon por pneŭmatika kaj ŝua fabriko, ĉu vi interesigas pri niaj produktoj? Se jes, bonvolu mendi nian informilon (en Esperanto kaj angla lingvo) kaj nian prospekton (en la angla lingvo). Shanyang Reclaimed Rubber General Factory, S-ro Li Liang, CN-110044 Shanyang, Ĉinio. Tel.: +86/24/893478.

La internacia E-familio estas la realo, ĉar mi helpas al vi trovi sinjor(in)o de via koro inter multaj diversaj geesperantistoj. INTIMO, p/k 2420, 660075, Krasnojarsk, Rusio.

**Kara leganto:** *A n o n c o v s e n p a g e* vian komercan agadon en *Gazeto Andaluzia*. Sendu al Poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio, vian proponon. Parolu pri niaj senpagaj anoncoj ankaŭ al neesperantistoj. Per tio vi helpas pligrandigi la prestiĝon de Esperanto kaj ties Movado. Ĉiutage kreskas la nombro de samideanoj kiuj gajnas monon per Esperanto.

**Investu en Monda Merkato!** La laboro rilate al *Monda Merkato* tiel kreskis dum la jaro 1992, ke ni ne plu povas pritrakti ilin kadre de la nuna entrepreno. Pro tio ni memstarigos *Monda Merkato* kun la du fakoj anoncgazeto kaj informservo. Ĉu vi volas investi monon en tian entreprenon? Aŭ alimaniere kunlabori? Se jes, skribu al: *Monda Merkato*, Pf. 1539, D-82355 Weilheim, Germanio.

Mi deziras aĉeti en Eŭropo tekstilaĵojn por distribui ilin en mia lando. Adreso: Yassi Ambroise, o9 BP, 1471 Abidjan, Côte d'Ivoire.

La 20-25an de aŭgusto 1993 ni okazigos Internacian Kunlabor-kunsidon de IKEF en Ĉinio. Nia kunsido celos la tri flankojn: 1) Interŝanĝi la spertojn pri la sukcesa apliko de Esperanto en komerco. 2) Liveri komercajn partnerojn. Ni esperu ke ĉiuj partoprenantoj havas sian konkretajn ideojn. 3) Fondi la komerc-ekonomian reton de IKEF tra Ĉinio. Kunsidoj: Hotelo Yeyuan, Xian, Ĉinio. Aligkosto: 10 usonaj dolaroj, Restadkosto: 100 usonaj dolaroj en dulita ĉambro, 140 usonaj dolaroj en unulita ĉambro. Xiana Esperanto-Asocio, s-ro Wang Tianyi, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xian, Ĉinio. Tele/fakso: +86/29/339619, telekso: 70182 SXSTW CN.

Internacia Kunlabora Informo-Firmao (VSIKIF). Niaj servkategorioj estas la jenaj: 1) Studi en eksterlando kaj akcepti eksterlandajn studentojn en Ĉinio, 2) komerco: a) okazigi eksponojn, b) servi kiel delegito de eksterlandaj firmaoj, c) fondado de restoracioj eksterlande, d) aliaj servoj. 3) Interŝanĝo de talentuloj. 4) Disvolvo de turismaj rilatoj. 5) Oferto de geedziga servo. VS Internacia Kunlabora Informo-Firmao, Zuo Jun (direktoro), Sian shi, Jinhua beilu 2 hao, 2-3-302, CN-710032 Ĉinio. Tel. kaj fakso: +86/(0)29/339619.

Mi faras ĉiuspecajn laboraĵojn sur komputoro kun lazerprintilo: mi tajpas tekstojn, libroj, revuojn, tezojn. Mi ankaŭ tradukas kunlabore kun aliaj de lingvo en alian lingvon, pere de Esperanto. Prezoj kaj pagkondiĉoj laŭ la laboro. Proponu kaj skribu al Stéphane Dupin, 90 bis rue Roger Salengro, F-94490 Ormeson, Francio.

Suskribaj pruntedonoj - konfidencaj transakcioj entute per poŝto. Detalajn informojn: Esperanto Mona Kredita Financa Komerca Agentejo, Esperanto-domo, PO Box 62, Illeh Ekpoma Edo Shtato, Nigerio.

Du originalaj poŝkarto de Zamenhof el jaroj 1908-1909, nesukcese atkciitaj ĉe la UK en Vieno, denove ofertotaj de UEA. Komenca prezo: 500 guldenoj po ekzemplero. Informoj ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Perado kun iranaj komercistoj por importo kaj eksporto. Serĉas katalogojn de perpoŝtmendaj kompanioj el tuta mondo (ekzemple pri komputiloj, fotiloj, aŭtopartoj, ilaro, ŝportvestaĵoj, ktp). Povas interŝanĝe sendi iranajn komercajn ĵurnalojn. Sro M. Rezai Saadat, P.O. Kesto 17185-533, Thran, Irano.

Fabrikado de altkvalitaj stipoj por virinŝuoj. Tarcucci, Pellivo 18, I-40062 Molinella (BO), Italio.

Mi serĉas personon kiu interesiĝas pri internacia politika laboro sur la bazo de integrala federalismo. D-ro R. Herrmann, Kronstädter Str. 24, DW-8500 Nürnberg 30, Germanio.



Esperanta Internacia Asocio de Deklaristoj en Dogano estis fondita en kadro de Matadia Esperanto-Centro. Celoj: Traduki internaciajn dogandokumentojn esperanten; enirigi Esperanton en internacian komercon. Kunlaborantoj kaj subtenantoj (unualoke el Eŭropa Komunumo) estas bonvenaj. Provizora sidejo: B.P. 211, Matadi 1, Bas Zaire, Zairio.

La eta gazeto, monata periodaĵo eldonata en Italio estas informilo de EKA (Esperanto Komerca Agado) kiu celas helpi la internacian komercadon pere de Esperanto. Turnu vin al: Esperanto, p.k. 601, I-34100 Trieste, Italio por ricevi senpagajn provekzempleron kaj informon.

Turisman Esperanto-servon ofertas Aspros-Francio: diversaj kvintagaj programoj de Atlantiko ĝis Parizo. Informigu ĉe: Aspros, Les Nids, F-49190 St Aubin, Francio.

Mi volas prunti 9000 Usonajn dolarojn por aĉeti aŭtopartojn aŭ mekanikan produktaĵojn kaj vendi ilin en Haitio. Mi serĉas kunlaboranton. Luzincourt F. Adrien, 34 rue J. Janvier, Port-au-Prince, Haitio.

Seŭla Esperanto-Kulturcentro volas interŝangi Esperanto-librojn kontraŭ libroj aŭ Esperantaĵoj el Koreio. Iuj, kiuj interesigis, bonvolu turni vin al SEK. Dir. LEE Jung-kee, CPO Kesto 3047, Seŭlo, Koreio.

Aperos *Listo de Esperantoturisma Servo 1994*. Se vi volas aperi en la listo, bonvolu sendi viajn informojn ĝis la 30.11.1993 al: Raimo Tuisku, Puistotie 81 C 14, 04430 Järvenpää, Finnlando.

Ŝtagojn por agentoj aranĝas EKA. Petu informon ĉe EKA, Esperanto Komerca Agado, p.k. 485, I-34100 Italio.

Ofertas informleteron pri lokaj kaj specialaj valutsistemoj kontraŭ tri irkoj. Sukcesaj sistemoj en anglalingvaj landoj. Bonvolu kontakti: LIDS-o, Leterfako 1731, Kitchener ON, Kanadio N2G 4R3.

*Mono*, la nova esperanto-lingva gazeto pri la gajnado de mono. Abonebla ĉe MONDA MERKATO, Pf. 1539, W-8120 Weilheim, Germanio. Fakso: +49/8809/1234.

Presado per moderna maŝinaro de ĉiuspecaj reklamoj, broŝuroj, kalendaroj... multkolora kaj bonkvalita. Eblas krei komunan entreprenon kun eksterlanda firmo. Sroj Georgi Runevski kaj Emil Savov, Firmao *Kontrast*, str. Jakov Krajkov 3, BG-1606 Sofia, Bulgario. Fakso: +359/2/658187.

Instru- kaj tetprogramo *Vytest* por (mem)instruado de geometrio en mezlernejoj por IBM-kongruaj komputiloj (ankaŭ retoj kia LAN Novell). Adapto al loka lingvo eblas. Demo-versio havebla. Ing. Vladimír Němec, ATOS s.r.o., Zvolenská 5, CS-01008 Zilina, tel. +/89/54135.

**Internacia Vendo-Reto SORTIMENTO (IVERS)** invitas vin kunlabori, por multe profiti finance, kaj ankaŭ morale! Detala priskribo de la projekto, aliĝilo kaj mendilo estas riceveblaj kontraŭ 2 irk-oj. Unika ebleco por utiliĝo de Esperanto kaj altigo de ĝia prestiĝo! Agentejo SORTIMENTO, Pf. 138, H-6100 Kiskunfélegyháza, Hungario.

Por informi kaj esti informita: *Eventoj* - la plej ofta internacia gazeto en Esperanto (aperas dusemajne). Abonu kaj kunlaboru ankaŭ vi! *Eventoj*, p. 87, H-1675 Budapeŝt, Hungario. Fakso: 36/1/1288-258.

Ni ofertas malmultekostan ripozon somere ĉe la Nigra Maro. Mini Max Business, Turismo & Komerco, Bl. 16 A, apt. 58, Gen. Stoletov Blvd., BG-1233 Sofio, Bulgario.

Turismo, artaĵoj (ekspozicio-vendado) reprezentado, eksporto de ŝafistaj hundidoj. Dir. M. Lineckij, Kultur-Komerca Centro *Esperanto*, pk. 539/1, UKR-254200 Kiev-200, Ukrainio. Tel.: +7/044/4328777.

Ĉina entrepreno de mineralakvaj produktaĵoj serĉas modernan mineralakvan muntoĉenon, biermuntoĉenon, sukuntoĉenon. Ankaŭ serĉas kunlaboron tutmonde. Skribu en Esperanto al: S-ro Vang Bing, Meicheng, Qianshan, Anhui, CN-246300 Ĉinio.

Ĉu vi bezonas informojn pri Albanio? Skribu al Albana Esperanto-Ligo, Informada Fako, ĉe Gafur Muco, Rruga Thanasi Ziko Nr. 56, Tirane, Albanio.

Serĉata eldonisto aŭ financa helpo por eldono de 140-paĝa porinfana verko tradukita el la kroata. Temas pri fama romano de Mato Lovrak *La kamaradaro de Petro Nodeto*, iaspeca kroata versio de *Knaboj el Paŭlo-strato*. La verko estas kompostita kaj prespreta. Por presigi ĝin en Kroatio necesas ĉ. 2000 DEM. La eldonisto aŭ financhelpanto ricevos kvanton laŭ interkonsento. Informoj: Esperanto-Klubo, pp. 96, HR-43350 Durdevac, Kroatio.

Mi serĉas personojn kiuj interesigas por internacia politika laboro sur la bazo de integrala federalismo. Dr-o R. Herrmann, Kronstädter Str. 24, D-W-8500 Nürnberg 30.

G. Kalckhoff, A. Pick y A. Broise, *Komputada Baza Terminaro*. La terminaro enhavas 369 terminojn en kvar lingvoj (Esperanto, angla, germana kaj franca) kun klarigoj en Esperanto. Havebla ĉe MONDA MERKATO, Pf. 1539, W-8120 Weilheim, Germanio. Bonvolu antaŭ-pagi 9'80 DM-ojn.


Importo, eksporto, turismo, maŝina konstruado / projektado. Adreso: Ing. Genčo Tzokanov, Firmao MINI MAX B., bul. "Gen. Stoletov", bl. 16A, apt. 58, BG-1235 Sofia, Bulgario.

Esperantista librokomerca entrepreno SIBLIBR en Kranojask proponas libron *Impeto 91 (socipolitika kaj beletra almanako)*, 240 p., 13x20 cm, ilustrita, 10 usonaj dolaroj, inkluzive sendokostoj. SIBLIBR, Box 24536, 660100 Krasnojarsk, Rusio.





*La emblemo de la 79a Universala Kongreso de Esperanto, kun la astronomia ŝtona observturo Chomsongdae, konstruita en 634.*







**ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO**  
Apartado 864  
E-29080 MALAGA  
Hispanio

La unua kongreso de la Esperanto-movado okazis en Vieno la 26an de aŭgusto 1888. La kongreso estis organizita de la "Asociacion de Esperanto" de Vieno. La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn. La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn. La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn.

La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn. La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn. La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn.

La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn. La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn. La kongreso estis la unua de la serio de kongresoj, kiuj okazis ĉiun kvar jarojn.